ESPERANTO LYON
7, rue du Major Martin 69001 LYON
tel: 33 (0)7 69 29 82 97
https://esperantolyon.org
https://www.facebook.com/EoLiono
https://www.instagram.com/esperantoliono

Qu'est-ce que le salon Primevère ?

C'est un salon organisé par une association et réalisé par 300 bénévoles, qui a pour ambition de réunir les acteurs de l'écologie pour présenter des alternatives militantes cohérentes et éthiques à la société actuelle, dans une ambiance conviviale.

ESPERANTO LYON a donc sa place dans ce salon.

Les espérantistes lyonnais y participent depuis sa création en 1986. Après une interruption de 3 années de 2020 à 2022, notre association a tenu son stand avec une équipe de volontaires, renouvelée pour partie, du 17 au 19 février 2023.

Comme les années précédentes des échanges intéressants ont été réalisés avec les personnes qui s'arrêtaient au stand, bien situé dans un angle d'allée, assez visible de l'entrée principale. Il est à noter que de nombreux jeunes ont interrogé les bénévoles de notre association et quelques uns sont repartis avec une BD de Tintin.

Le fait le plus marquant, fut la visite d'un jeune couple franco-chinois, qui a évoqué la difficulté d'apprendre le chinois pour l'un et la difficulté d'apprendre le français pour la famille proche restée en Chine, de la jeune fille chinoise. Au bout de quelques minutes celle-ci a pensé faire apprendre l'espéranto à sa mère et son compagnon s'est montré enthousiaste pour l'espéranto, langue beaucoup plus facile à étudier et qui devrait permettre de faciliter assez rapidement leurs échanges familiaux.

175 dépliants d'Espéranto France et petits livrets « L'espéranto c'est dans la poche » ont été distribués pendant la durée du salon.

Rédigé par Andréa Bertrand

Kio estas la foiro Primevere ?

Temas pri foiro organizita de asocio kaj farata de 300 volontuloj, kiu celas kunigi ekologiajn agantojn por prezenti koherajn kaj etikajn aktivismajn alternativojn al la nuna socio, en amika etoso.

ESPERANTO LYON do estas ĝuste lokita en tiu ĉi salono.

La Lionaj esperantistoj partoprenas en ĝi ekde ĝia kreiĝo en 1986. Post 3-jara paŭzo de 2020 ĝis 2022, nia asocio tenis sian standon kun teamo de volontuloj, parte renovigita, de la 17a ĝis la 19a de februaro 2023.

Kiel en antaŭaj jaroj**,** oni faris interesajn interŝanĝojn kun homoj, kiuj haltis ĉe la stando, bone lokita en angulo de la koridoro, sufiĉe videbla de la ĉefa enirejo. Notu, ke multaj junuloj pridemandis la volontulojn de nia asocio kaj iuj foriris kun bildstrio de Tinĉjo.

La plej okulfrapa evento estis la vizito de juna franc-ĉina paro, kiu parolis pri la malfacileco lerni la ĉinan por unu kaj la malfacilecon lerni la francan por la proksima familio, kiu restis en Ĉinio, de la ĉina junulino. Post kelkaj minutoj ŝi pensis instigi sian patrinon lerni Esperanton kaj ŝia kunulo entuziasmiĝis pri Esperanto, lingvo multe pli facile studebla kaj kiu ebligus sufiĉe rapide faciligi iliajn familiajn interŝanĝojn.

Dum la foiro estis disdonitaj 175 flugfolioj kaj etaj libretoj "Esperanto estas en via poŝo".

Raportis Andréa Bertrand